



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 3
1972

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
38-a (43-a) jaro
Monata

ESPERANTO-STANDO EN OSLO

En la foiraj haloj de Oslo okazis ekspozicia aranĝo «Ferio-Libera tempo 1972». Simila aranĝo jam okazis antaŭe; sed ĉijare por la unua fojo troviĝis tie Esperanto-stando. Ĝi estis aranĝita en kunlaboro inter Klubo Esperantista en Oslo, Norvega Esperantista Ligo, loka grupo de fervojistaj esperantistoj kaj la Esperanto-grupo de studentoj.

La ekspozicio, kiu daŭris de la 13a ĝis la 23-a de aprilo, havis pli da vizitantoj ol iam antaŭe, entute 84 000 personojn. Ne ĉiu el tiuj 84 000 haltis ĉe la Esperanto-stando por informiĝi pri la internacia lingvo; sed al la deĵorantoj neniam mankis vizitantoj al kiuj ili montru, aŭdigu, klarigu, konvinku. La stando havis magnetofonon per kiu la vizitantoj povis konvinkiĝi pri la belsoneco de la lingvo, samtempe legante la tekston aŭskultatan. Sur la muroj estis mapoj pri la mondo kaj pri Eŭropo, kun surmetita punkto montranta la geografian situon de ĉiu delegito de UEA. Tiuj mapoj estis la rezultato de multtaga pacienca laborado de studenta membro, Erling Killingbergtrø. Tria mapo, desegnita de



sino Eva Støp-Bowitz, montris ĉiujn lokojn en Eŭropo «Kie esperantistoj renkontiĝas en 1972». Ĉiuj mapoj vekis atenan intereson de multaj vizitantoj.

Librobretaro enhavis specimenojn de Esperanta literaturo kaj de Esperantaj revuoj, prospektoj, broŝuroj, interalie pri Esperantaj kongresoj, renkontiĝoj kaj aliaj aranĝoj.

Multaj lokaj esperantistoj laŭ antaŭe farita hortabelo dividis inter si la horojn de deĵorado.

La aranĝinta komisiono petis transdoni tutkoran dankon al tiuj kiuj afable kontribuis al la sukceso per alsendo de diversaj Esperantaj presaĵoj.

Por ekzerco kaj studo:

LA DIAMANTO

Diamanto estas pura karbono kristaliginta. Ĝi estas la plej malmola mineralo, kiu ekzistas. Tial la antikvaj grekoj nomis ĝin adamant, la nevinkebla. Jam en la plej frua tempo oni konsideris ĝin juvelŝtono, aŭ pro ĝia malofteco, aŭ pro ĝia beleco. Oni frue ekvidis ĝian kapablon refrakti la lumon, se oni facetis ĝin.

Det kan være en god øvelse å oversette dette til norsk, la det ligge noen dager, og så oversette det tilbake til Esperanto, gjerne ved hjelp av ordbok. De skal se det melder seg problemer. La oss se på dem.

«Diamant er rent krystallisert kullstoff»: Det er to adjektiver til substantivet. For stilens og velklangens skyld er de satt på hver sin side av substantivet. «Krystallisert» er perfektum patrisipp — på Esperanto har man ett aktivt og ett passivt. Hvilket skal man bruke? Vil man uttrykke at kullstoffet «har krystallisert seg», bruker man det aktive, som i teksten ovenfor. Vil man understreke at en ytre kraft «har krystallisert» kullstoffet, skriver man kristaligita. Forfatteren her er uvitende om disse krefter, og har ikke tatt noe standpunkt.

«De gamle grekere»: Ikke gamle av år og alder, altså ikke maljunaj. Ikke gamle i motsetning til nye, altså ikke malnovaj, skjønt det kunne vært en brukbar oversettelse. *Antikva* betyr «som har eksistert for lenge siden og som ikke lenger eksisterer», altså omtrent: pratempa.

«I den tidligste tid»: En la pratempo eller En la plej frua tempo. Unngå konstruksjoner som «En la plej frua pratempo», da *plej frua* og *pra* uttrykker det samme.

«Man betraktet den som smykkesten». Oversett enten konsideris ĝin juvelŝtono (uten akkusativ-N) eller konsideris ĝin kiel juvelŝtonon (med N). Dette fenomen kommer vi senere tilbake til.

«På grunn av dens sjeldenhet eller dens skjønnhet». Det anbefales å gjenta preposisjonen pro.

«Man så tidlig dens evne til . . .» Her betyr «så» «ble oppmerksom på», altså ikke bare vidis, men ekvidis.

«Bryte lyset». Bryte betyr her ikke det samme som knekke. Man har et eget ord for å bryte lys: refrakti.

«Slipe diamanter» er ikke det samme som å slipe kniver. Sliper man en kniv, er det for å gjøre den skarp, akra, altså akriĝi. Her gjelder det å gi diamanter fasetter, altså faceti.

Ak III



På Norsk

MILANOMESSEN BRUKER ESPERANTO

I år kan Milanomessen feire sitt 50-årsjubileum. Messen holdes fra 14. til 25. april under mottoet «Ung i dynamikk — moden i erfaring». Messefolkene har i år benyttet det internasjonale språket Esperanto i sin reklame — det er utgitt jubileumsplakater med tekst på esperanto. Messen i Barcelona har for lengst tatt i bruk Esperanto som reklamespråk.

PEKING MED ESPERANTO-SENDINGER

Blant de mange radiostasjoner verden over som sender regelmessig på det inter-

(Daŭr. p. 43)

Norgea Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Redaktora suspiro

La redaktoro devas pravigi samideanon Otto Prytz koncerne la malfruan aperon de artikoloj kaj raportoj en nia gazeto. La afero ne estas facila: Ofte venas ekz. klubraporto (pri kunveno antaŭ unu monato!) la tagon post finita redaktado. Kiam la presprovaĵoj venas de la kompostisto, li elŝovis plurajn klubraportojn

pro tro da materialo. Tiuj raportoj devos aperi en la proksima numero, kvankam ili iom neaktualigis. La redaktoro provis du — aŭ trifoje ne presigi tiajn raportojn. Tion li ne plu faros, ĉar la kluboj forte reagis. Tio ja montras, ke la intereso ekzistas. Sed la redaktoro suspiras, kaj pravigas Otton Prytz: la afero ne pliboniĝas pro duona nombro da gazetoj en la jaro!

ELDONEJO

ESPERANTO INFORMAS:

Poŝatlaso de la Mondo, kun esperantaj nomoj, kun flagoj kaj multaj informoj pri ĉiuj landoj, estas fine havebla. Prezo: kr. 13,50 (+ afranko kr. 1,50).

Eldonejo Esperanto A/S, Boks 942, Oslo 1. Poŝtgiro: 100.31.

POŝTMARKO-DONACOJ

S.ro Thorvald Dybvig sendis al Norvega Esperantisto valoran donacon. Tuta keŝteto da uzitaj poŝtmarkoj! Koran dankon!

Dankon ankaŭ al Grupo Esperantista en Trondheim pro 32 kronoj ricevitaj por venditaj poŝtmarko-kovertoj!

Sciigoj de N.E.L.

Aŭtuna agado. Ankaŭ la jarraporto de N.E.L. pri 1971 ne montras kreskon de la membronombro, ĉar okazis tro malmultaj kaj tro malgrandaj kursoj por kompensi la naturan perdon. La kotizenspezoj ne sufiĉas por daŭrigi nian normalan laboron, la kalkuloj montras deficiton. Tial ni povas en 1972 aperigi nur 6 numerojn de nia gazeto. Tia evoluo devas ne daŭri. Nur la kluboj kaj la rektaj membroj povas alporti ŝanĝon. La Liga Estraro tial denove insiste admonas al ĉiuj klubaj estraroj tuj kunveni por plani aranĝon de kursoj dum la venonta aŭtuno. Lastatempe montriĝis markita

kresko de intereso en la publiko, multloke en la lando. Per bone planita laboro oni povas kolekti interesigantojn por kursoj. Sed necesas plani la kursagadon en bona tempo. Do, *ekagu jam nun!* N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialoj kaj konsiloj. Oni povas ricevi ŝtatan subvencion por la salajro de la kursgvidanto. Se neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi nian gazetkurson (skribu al N.E.L. pri regularo kaj provleciono). Sed komencu jam nun plani la aŭtunajn kursojn! — N.E.L. havas ankaŭ pli ol 100 rektajn membrojn. Certe ankaŭ multaj el ili povus starigi kurson aŭ studrondon. Ni tial direktas ĉi tiun alvokon ankaŭ al ili. Ni petas ĉiun rektan membron, kiu estas preta fari klopodojn en tiu direkto, skribi al N.E.L., kaj ni plezure helpos ilin. Post kurso aŭ studrondo oni povos fondi Esperanto-klubon en la loko. Estas tre dezirinde fondi klubojn en multaj novaj lokoj.

Taskotabelo por kluboj — Junio: La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1-a jarduono dorsflanke (blankedo A 10/E 1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj. La estraro planas la kunvenojn de la venonta monato.

Septembro: La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 1-a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj kaj oni elsendis unu cirkuleron. Oni pretigis la budĝeton por 1971. Oni sukcesis havigi ilustraĵojn por la nova eldono de la folio «Velkommen til Esperanto-bevegelsen». Oni decidis kune kun Klubo Esperantista en Oslo partopreni per stando en la foiro «Ferie og Fritid» en Oslo kaj tiuokaze presigis du broŝurojn en sume 30 000 ekzempleroj. Oni vane klopodis igi la norvegan televidon havigi kaj sendi la televidkurson de TELEAC. Oni komencis plani agadon okaze de la skolta ĵamboreo en Norvegujo venontjare. Oni traktas kun italo pri eventuala prelegvojaĝo en Norvegujo venontjare. Oni intense laboris por fine aperigi la longjare atendatan «malŝlosilon». Oni traktas kun la ceteraj nordaj landoj pri propono pri komuna nordlanda Esperanto-gazeto.

La Liga Estraro.

LA KONTORFONDAJO

| | |
|--------------------------------|------------|
| Pli frue | kr. 260,00 |
| Bj. Aandahl | » 35,00 |
| S. Korstvedt | » 40,00 |
| E. Gjessing | » 65,00 |
| Mara Vento | » 100,00 |
| R. Bugge-Paulsen | » 30,00 |
| E. Almås | » 10,00 |
| S. Ebeltoft | » 10,00 |
| C.S.B. | » 20,00 |
| M. Støren | » 5,00 |
| Olga kaj Oddvard Øvsthus | » 65,00 |
| | <hr/> |
| | kr. 640,00 |

KAMPANJO REISÆTER

| | |
|--------------------------|--------------|
| Pli frue | kr. 600,00 |
| Lina Gabrielli k.a. | » 300,00 |
| C. Støp-Bowitz | » 100,00 |
| O. Thormødsen | » 100,00 |
| Kr. Sivertsen | » 100,00 |
| Leonora Sivertsen | » 100,00 |
| Arthur Bjerke | » 100,00 |
| Johan Matland | » 100,00 |
| | <hr/> |
| | kr. 1 500,00 |

LA PROPAGANDA FONDAJO

| | |
|-------------------|--------------|
| Pli frue | kr. 150,00 |
| S. Ebeltoft | » 10,00 |
| Anonima | » 1 000,00 |
| | <hr/> |
| | kr. 1 160,00 |

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

SUBTENANTAJ MEMBROJ 1972

- Steffen Kjetland
- O. J. Rønnevig
- Agnete Anjer
- Ludvig Anjer
- Bjørg Skaret
- Ågot Pedersen
- Sigrid Hole
- Knut Syversen
- Elna Matland
- Johan Matland
- John Berggreen

*

JARKALKULO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Spezoj 1971

Enspezoj:

| | |
|---|----------|
| Klubkotizoj | 3 431,00 |
| Rektaj membroj | 1 902,00 |
| Norvega Esperantisto, membro-abonoj | 4 300,00 |
| Norvega Esperantisto, rektaj abonoj, anoncoj, kontribuo | 1 966,24 |
| Rentumoj | 156,77 |
| Donacoj, lukontribuo | 2 254,75 |
| El la kontorfondaĵo | 335,39 |
| El la kapitalo: manko | 1 187,52 |

Elspezoj:

| | |
|--------------------------------|----------|
| Kostoj | 1 731,16 |
| Amortizo | 230,00 |
| Norvega Esperantisto | 7 966,84 |
| Luado | 2 590,14 |
| Afranko | 1 146,25 |
| Gazetara Servo | 1 270,28 |
| Kotizoj al U.E.A. | 430,00 |
| Kotizoj al la Distriktoj | 169,00 |

| | |
|-----------|-----------|
| <hr/> | <hr/> |
| 15 533,67 | 15 533,67 |
| <hr/> | <hr/> |

BILANCO JE 31/12 1971

| | | | |
|---------------------------------------|-----------|-----------|----------|
| <i>Aktivaĵoj:</i> | | | |
| En la kaso | 560,59 | | |
| Poŝtĝirokonto 100.30 | 998,77 | | |
| Meblaro | 2 346,88 | | |
| ÷ amortizo | 230,00 | 2 116,88 | |
| <hr/> | | | |
| 254 akcioj en Esperantoforlaget A/S.. | 5 588,00 | | |
| 5 akcioj en «Agado» | 50,00 | | |
| | | | |
| <i>Debitoroj:</i> | | | |
| Prop.fond en Oslo | | | |
| Sparebank | 9 421,88 | | |
| Andresens Bank | 6 096,15 | | |
| Div. debitoroj | 2 411,86 | 17 929,89 | |
| <hr/> | | | |
| <i>Pasivaĵoj:</i> | | | |
| Div. kreditoroj | | | 6 088,58 |
| La kontorfondaĵo | 2 136,86 | | |
| + donacoj | 1 654,75 | | |
| <hr/> | | | |
| | 3 791,61 | | |
| ÷ lupago | 1 990,14 | 1 801,47 | |
| <hr/> | | | |
| | 3 465,76 | | |
| «Esperantonytt» | | | 3 465,76 |
| La Propaganda Fondaĵo | 10 318,40 | | |
| + rentumoj | 515,90 | | |
| <hr/> | | | |
| | 10 834,30 | | |
| ÷ elspezoj | 1 412,50 | 9 421,80 | |
| <hr/> | | | |
| Konservataj klubkaso | | | 1 059,00 |
| Garantifondaĵo dumvivaj membroj .. | | | 1 746,00 |
| Kapitalo | 4 849,04 | | |
| ÷ manko | 1 187,52 | 3 661,52 | |
| <hr/> | | | |
| | 27 244,13 | 27 244,13 | |

la 31an de Decembro 1971

Oslo,

la 9an de Aprilo 1972


Aslaug Refsing, John Selbekk
revizoroj

Karl Ekhaugen
kasisto

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



Kombinita
kamiono
ŝosea/traka

La jena bildo montras al vi tute novan kamionon, konstruitan por veturado kaj sur ŝoseo kaj laŭ fervojo.

Estas la entrepreno Mercedes-Benz kiu konstruis ĝin por la Britaj Fervojoj, kaj ĵus ĝi estis ekspoziciata ĉe la teknika centro de la fervojo en Derby.

Ĝi estas ekipita per forta gruo, sekve oni povas uzi ĝin kiel manovrad-lokomotivon.

Daŭre ĝi povas esti uzata por vartransportoj, laŭplaĉe sur reloj aŭ sur ŝoseo, rekte de kaj al la magazeno de la kliento.

(Informoj de Frank M. Easton)

Mi memorigas pri La Fervoja Terminaro Norvega-Esperanta, Esperanta-Norvega, kiun vi povas mendi ĉe mi laŭ la adreso en «Fervoĵista Paĝo». Se vi dezirus mendi ĝin laŭ mia deĵoradreso ĝi

estas: St. form. I Odd Kolbrek, Lodalen, Oslo Ø. Vendoprezo en Norvegujo 5 kr., eksterlande samvalore kiel I US dolaro.

La malnova lokomotivo, kiu dum preskaŭ 100 jaroj tiris la trajnojn de la «Norda Fervojo» laŭ la linio Milano-Saronno, faris sian lastan vojaĝon. Ĝi konstruiĝis en Belgujo kaj ekdeĵoris en 1879 kaj poste deĵoris sen interrompo.

Nun ĝi estis gaje akompanata al restoracio situante ĉe aŭtoŝoseo de Saronno kaj nomigante «Grill Lazzaroni». En ludparko situante ĉe ĉi tiu restoracio ĝi restos por ĝui merititan ripozon sed ankaŭ por ĝojigi la infanojn kaj por scivolemigi la plenkreskulojn.

(El la itala semajna gazeto «Famiglia Christiana»)

Setälä 80-jara

Mag. Vilho Setälä, la fajrero de la finnaj esperantistoj festis en aprilo sian 80-jariĝon. S-ro Setälä, kiun konas multaj norvegaj esperantistoj, estas membro de Akademio de Esperanto. Kiel fotografo li estas pioniro — kaj artisto. Ni postfeste kore gratulas!

JHR.

LA SVEDA KOLEGO JUBILEAS

S-ro Åke Blomberg, la redaktoro de «La Espero» (la sveda Esperanto-gazeto) estis 50-jara la 25-an de februaro. Post-festajn gratulojn, kara kolego kaj amiko!

JHR.



S-ro C. C. Goldsmith, la multjara ĝenerala sekretario de Internacia Esperanto-Ligo, mortis 82-jara en Aŭstralio, kie li estis sekretario de Aŭstralia Esperanto-Asocio.



Rose Szilágyi, la vidvino de D-ro Ferenc Szilágyi, mortis, kelkaj jarojn post sia edzo. Ŝi estis tre ĉarma homo kaj lerta kaj fidela esperantisto. Post la morto de la edzo ŝi estis honora redaktoro de «Norda Prismo».

*

La cirkaŭpremo en la mallumo

Dankon ĉar vi permesis al mi loĝi sub sama plafono, en sama ĉambro, ĉe mi, momenton de mia tempo. Dankon ĉar vi donis lumon al miaj okuloj, sonon al miaj oreloj, feliĉon al mia koro. Pro vi malaperis mia nekomprenebla malriĉeco. Dankon. Vi estis antaŭ mi senkaŝe, plenplena de lumo, vi havis burĝonojn kiuj ruĝiĝis dum la irado al nedividito.

En la mallumo staris iu. Subite mi eksentis la proksimecon de la vivo. Vi ĉirkaŭpremis min kaj karesis miajn nudajn ŝultrojn. Tiel vi renkontis mian povran estajon, senreserve. Mi konis vian aŭron; neĝsteloj blovitaj de grandaj neĝmontoj degelis en via hararo: mi sentis la odoron kvazaŭ milda noktopluvo falanta dum la ĝerma sezono.

Neniam mi forgesos ĝin: la ĉirkaŭpremo. Vi estis bona al mi, la sola bona al mi. Vi komprenis la vagantulon, la stumblulon, vi etendis al li viajn manojn kiam ne plu restis lumo en lia lumilo. Vi kondukis lin sur la vojon al la ebena de Saron. La sendubon li legis en via vizaĝo; li ĝin legis en via tuta estaĵo; kaj li estos eterne dankema. La espero por stumblulo estas ĉiam la kordoj de mildeca menueto.

La fido kiun vi montris al mi estis simbola ago de nobleco, ĝi estis ĝisfunda, neniam mi povus imagi kaj atendi ĉi tiun geston.

Dankon pro la karesoj, pro la ĉirkaŭpremo en la mallumo, dankon pro la ringo fermita ĉirkaŭ mi. Finfine alvenis por ekmaturo ankaŭ mia anima grenkampo . . .

Kjell Walraamoen.

Internaciaj Ferial Kursoj Helsingør, Danlando

23.—30. 7. 1972

Ni invitas vin veni al Helsingør (Elsinoro) por ĉeesti niajn internaciajn feriajn kursojn, konatajn en la tuta Espermondo, ĉar ili funkcias jam 40 jarojn. Ordinare ĉeestas pli ol 100 personoj el 10—15 diversaj landoj. — Tie vi havos riĉan eblecon de konversacia ekzercado kaj por trovi internacian amikecon kun multaj diverslandaj gesamideanoj.

La hejmo de niaj kursoj estas *La internacia Atlernejo*, kiun ĉirkaŭas granda parko, kie la kursanoj ĝuas multajn promenojn. Ĉiuj partoprenantoj loĝas kaj manĝas en la altlernejo.

Nur antaŭtagmeze okazas la instruado — en jenaj kursoj:

- 1) *Elementa kurso* laŭ metodo Friis.
- 2) *Konversacia Kurso*.
- 3) *Perfekta Studrondo*. Stilo kaj formo de nia lingvo estas la ĉefaj temoj de la studrondo studado kaj diskutado.
- 4) *Prepara Kurso por Friis-metodaj ĝinstruistoj*. Ĉi tiu metodo — simila al NATURMETODO — estas la metodo de la moderna tempo.

NB. Ankaŭ *Ne-Kursoj* estos kore bonvenaj en ĉi tiu semajno.

La kursojn 1 + 4 gvidos s-ino Elin Andersen, Stubbkøbing, la kurson 2 gvidos s-ino Tove Bak, Brabrand, kaj numeron 3 gvidos s-ro Moravec, Flensburg.

Posttagmeze ni aranĝos komunajn *ekskursojn* al diversaj vidindaj lokoj, ekz. al Kronborg (kastelo de Hamleto), Hillerød kaj la kastelo Fredensborg. — Vespere ni aranĝos prelegojn, prezentadon de lum-

bildoj kaj filmoj, eble dancadon, kanton kaj diskutojn.

Turnu vin al

S-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 *Abyhøj*, Danlando.

*

Bela glumarko por la libro-jaro

Leteroj en Esperanto estas ĉi-jare ornamataj per nova bela glumarko. Per simpla emblemo kaj klara surpriso ĝi proklamas, ke la jaro 1972 estas la «Internacia Libro-Jaro». Tiel la eldoninto, Universala Esperanto-Asocio, samtempe apogas la tutjaran kampanjon de Unesko, kiu lanĉis tiun ideon, kaj ankaŭ memorigas, ke estas aparte stimulinda la literaturo en la Internacia Lingvo.

La simbolon de la Libro-Jaro desegnis por Unesko Michel Olyff (Belgujo). Per du interligitaj homfiguroj sur la fono de malfermita libro ĝi simbolas la internacian kunlaboron. La celo de la monda kampanjo estas: kreskigi kaj plibonigi la produktadon kaj distribuadon de libroj, precipe en la evoluantaj landoj.

La Esperantan glumarkon — kun verda kaj nigra preso sur blanka fono — projektis por UEA Karlo Bartosik (Britujo), kiu desegnis ankaŭ la glumarkon kaj afiŝon de la 56a Universala Kongreso de Esperanto en Londono. La glumarko aperis en 80 000 ekzempleroj.

*

57-a universala kongreso de esperanto Portland (Oregon), 29.7.-5.8.1972

Alta Protektanto: Governor Tom McCall,
Estro de la ŝtato Oregon.
Konstanta Adreso: Nwe Binnenweg 176,
Rotterdam - 3002, Nederlando

Adreso de KKS

Se oni skribos al la Kongresa Sekretario s-ro Nevan pri aferoj, kiuj ne rilatas al administrado (pagoj, mendoj ktp.), oni bonvolu adresi la leterojn post la 15-a de aprilo 1972 al la 57-a UK de Esperanto, P.O.Box 786, Portland, Oregon 97 207, Usono.

Esperanto-kursoj en Portland

Dum tri semajnoj antaŭ la Universala Kongreso okazos en la Universitato de Portland oficialaj kursoj de la Internacia Lingvo sub la gvido de universitataj profesoroj Duncan Charters, Edmund Brent kaj Richard E. Wood. Detale informas kaj aliĝojn akceptas s-ino Hazel Heusser, 6644 S.E. 82nd Avenue, Portland, Oregon 97 266, Usono.

Organizaĵoj invitas esperantistojn ..

Oregona Advokata Asocio, Oregona Medicinista Asocio kaj diversaj porpacaj kaj religiaj organizaĵoj invitas eksterlandajn gastojn de la koncerna fako al specialaj kunsidoj kaj komunaj lunĉoj. Atendataj estas ankaŭ kunvenoj kun Leonoj Internaciaj, Rotarianoj kaj reprezentantoj de aliaj internaciaj organizaĵoj.

Statistiko (29. marto 1972).

Argentino 2, Aŭstralio 7, Aŭstrujo 2, Belujo 9, Brazilo 4, Britujo 21, Bulgarujo 12, Ĉeĥoslovakio 4, Danlando 5, Egipt-

ujo 5, Finnlando 15, Francujo 35, F.R. Germanujo 29, Grekujo 4, Hispanujo 12, Hungarujo 5, Israelo 1, Italujo 24, Japanujo 23, Jugoslavio 9, Kanado 31, D.R. Kongo 2, Koreujo 8, Madagaskaro 1, Meksiko 9, Nederlando 37, Norvegujo 8, Nov-Zealand 5, Peruo 1, Pollando 6, Portugalujo 3, Rumanujo 1, Sovet-Unio 1, Svedujo 26, Svislando 11, Usono 239, Venezuelo 1. Entute 618 aliĝintoj el 37 landoj.

*

Vizo por Hungarujo

Hungara Esperanto-Asocio informas ĉiujn, kiuj deziras partopreni la eventojn de la Hungara Kultur-Festivalo — sub aŭspicio de UEA —

okazonta la 17—23 julio 1972 en Budapeŝto, ke la aliintoj de la Festivalo ricevos vizon por la daŭro de la Festivalo, t. e. por 7 tagoj sen deviga valutŝanĝo. Al la aliĝintoj, kune kun la Aliĝkarto ni sendas atestilon, kiun prezentante al la hungara ambasado en la koncerna lando oni disponigas la vizon.

O. Nicolaisen:

TRA AZIO

Vojaĝi estas ĉiam granda plezuro. Speciale se oni havas sufiĉe da tempo kaj mono, sed oni povas ĝui la veturadon ankaŭ kun malmulte da mono.

Dum mia longa vojaĝo tra Finnlando, Sovet-Unio, Japanujo, Okinawa, Tajvano, Hong Kong, Bangkok, Malajσιο, Singaporo kaj Cejlono, mi konatiĝis kun multaj homoj. Mi vidis la laboron, la hejmojn kaj la kutimojn. Ĝuis la diversajn manĝaĵojn.

Dum mia 6 semajna restado en Japanujo mi faris multajn prelegojn por pli ol 1000 personoj en esperantaj grupoj. Ĉie estas tre granda entuziasmo inter la ĝejunuloj por lerni nian lingvon. La aktiveco de la kluboj estas tre granda.

Dum la vojaĝo mi notis kelkajn okazintaĵojn kaj impresojn. La doganistoj en Sovet-Unio estis teruraj. Ni devis depreni ĉiujn vestojn kaj ili traserĉis ĉion. Sur la brakoj mi havis 3 horloĝojn (kiel donacon al malriĉaj infanoj en Cejlono.) La doganistoj prenis ilin kaj diris, tio estas kontrabando. Dum la vojaĝo tra Sibirio per trajno pluvis kaj estis malvarme. Enuiga vojaĝo Ebriaj rusoj. Kriantaj infanoj. Malĝentilaj servistinoj. Se mi demandis en la stratoj pri la vojo, la homoj tuj foriris, kiam ili aŭdis fremdulon. Antaŭ la ekveturo mi skribis al esperantistoj en Sovet-Unio, sed ne ricevis respondon. La veturo per ŝipo de Habrowsk al Yokohama estis agrabla kaj plezura.

Dum mia restado en Japanujo mi plej parte loĝis en la hejmoj de esperantistoj. Eŝtis vere interese vidi la hejman vivon de ili. Dormi sur «tatamio» (ia matrace sur la planko) sidi sen seĝo de malalta tablo. Manĝi rizon kun aldonajoj. Inter alie kruda ovo kaj kruda fiŝo kun mara herbo. Manĝi per bastonetoj.

Oni ne forĝas facile la homamasojn en ĉiuj grandurboj. Pli ol plenplenaj tranoj, aŭtobusoj kaj trajnoj.

De Kagosima (Japanujo) mi veturis per ŝipo al Okinawa kaj de tie al Tajvano. Ŝtormaj tagoj. Poste per bona ŝipo al Hong Kong. Flugis al Bangkok, Trajno suden al Singaporo. Sed haltis dum du semajnoj en Penang en Malajσιο. Tre bona kaj bela banloko sur insulo. Similas al Cejlono.

Jes, Cejlono estas vere bela, agrabla kaj varma insulo kun multaj tre bonaj banlokoj. Blanka sablo. Varma marakvo. Grandaj ondoj. Palmoj svingantaj en la agrabla venteto de la maro. Sed la medalo havan ankaŭ dorsan flankon: malriĉeco, senlaboruloj, almozetantoj, muskitoj kaj manko de multaj objektoj kaj manĝaĵoj, kiun turistoj trovas necesaj.

Pro la favora monŝanĝo (kaj libera merkato) oni povas vivi tre malkare en Cejlono. Troviĝas sufiĉe bonaj hoteloj kie mi pagis nur kr. 1,50 por la nokto kaj kr. 2,50 por tagmanĝo.

Post la agrabla pli ol du monata restado en Cejlono mi veturis per ŝipo al Hindujo. La ŝipo estis plenplena de tamilfamilioj. Hinda popolo kiu devas forlasi Cejlonon kaj reveturi al sia pli frua hejmlando. Multaj ploris ĉar ili devis forlasi sian hejmon (= iomete paradizon) en Cejlono.

La Cejlona registaro (singalesa) volas malgrandigi la instruadon de la angla kaj tamila lingvoj en la lernejoj. Ili volas enkonduki la religion de Buddha kiel ŝtatan religion. Do, vere la marŝado estas malantaŭen.

*

(Daŭr. de p. 34)

På norsk

nasjonale språket Esperanto, finner vi nå også Peking. Kina distribuerer også Esperanto-utgaver av sine mest kjente bøker og tidsskrifter.

«KJÆRE LØGNHALS»

PÅ ESPERANTO

Det kjente teaterstykket «Kjære løgnhals» ble nylig oppført på Esperanto i Bulgarias hovedstad Sofia i forbindelse

med et stort Esperanto-arrangement. Esperanto er vel egnet som scenespråk, da det er meget klart og velklingende.

ÅRETS ESPERANTOKONGRESS

holdes i Portland, Oregon 29.7.—5.8. — Til nå er påmeldt nærmere 1 000 deltagere fra 37 land, den norske kontingenten blir på ca. 10.

All post som går ut fra kongressen, vil bli forsynt med et spesielt stempel, og det amerikanske postvesen overveier å utgi eget frimerke i anledningen. 20 fagforbund innenfor det internasjonale Esperantoforbundet har anmeldt egne møter; det gjelder leger, radioamatører, journalister, lærere, vitenskapsmenn og en rekke andre. Alle møter under hele kongressuken foregår uten tolker, fordi deltakerne benytter det internasjonale språket Esperanto.

MEDLEMMER I 88 LAND!

Ikke mange organisasjoner kan skilte med at de har en medlemsstokk fra ikke mindre enn 88 land. Det kan imidlertid det internasjonale Esperanto-forbundet, Universala Esperanto-Asocio. Og det skulle mer enn noe annet vise tydelig og greit at Esperanto er et språk som brukes internasjonalt, over hele verden.

ESPERANTO OGSÅ I ØSTERRIKSKE SKOLER

For ikke lenge siden kunne man lese en melding om at Esperanto var blitt fag ved en rekke tyske skoler av forskjellig kategori. Nå meldes det fra Wien at det østerrikske undervisningsdepartement har gitt sin tillatelse til at Esperanto blir satt opp som fag i 3. og 4. klasse i skolene. Samtidig arrangerer det pedagogiske insti-

tutt i Wien kurser i det internasjonale språket for lærere. Disse kursene teller som kompetansekvivende i lærernes videre utdanning.

*

Recenzioj

LA DUA BAUDELAIRE EN ESPERANTO

Charles Baudelaire: La spleno de Parizo. Traduko de Paul Lobut. Eldonojo Koko, København -67.

Jam pasis longa tempo post la apero de tiu ĉi libro, sed nur en 1972 ĝi venis al mia posedo. Tamen ĝi ne estas ankoraŭ preparolata en nia gazeto, kvankam pluraj ricevis ĝin por recenzo — kion ili rifuzis.

Mi komprenas la kialon. Ne estas facile recenzi tian libron: Ial ĝi apartenas al la mondliteraturo, kaj oni trovis ĝin inda por la serio «Oriento-okcidento». Samtempe mi ne povas kompreni ĝian valoron. Jes — stilo ĝi estas majstra. Temas pri subluma arto, per kiu la aŭtoro kreis prozan poezion. Sed kune kun la alia libro de la sama aŭtoro, «La Floroj de l'Malbono», ĝi estas esprimo de malsana animo, kies emoj iras al la maldeliktataĵoj kaj abomenindaĵoj de la vivo. Nun ambaŭ liaj verkoj troviĝas en la internacia lingvo, kvankam multaj aliaj, pli konstruaj, ankoraŭ ne troviĝas, aŭ ne trovis eldoniston. Nu — pri gusto ja ĉiam devas esti malsamaj opinioj.

La libro estas bone tradukita. Tamen, jen frazo el la traduko: «Mi scias, ke la Demonio volonte hantas la aridajn lokojn.» Ne multaj esperantistoj komprenas tiun frazon sen uzo de vortaro — kaj verŝajne serĉus la vortojn vane. Traduko

de la multaj vortoj, ne troveblaj en la Plena Vortaro kun ties suplemento, troviĝas en la libro. Sed ne devus esti neceze igi la internacian lingvon tiel malfacila, ke ĝi perdos unu el la plej grandaj avantaĝoj. Ne estus neeble traduki la libron same bone sen tiu troa uzo de novaj vortoj.

Haro.

Kial ne debatoj en «Norvega Esperantisto»?

Antaŭ kelka tempo, en artikolo de la serio pri la laborplano de NEL, oni esprimis mireton pri tio, ke en «Norvega Esperantisto» preskaŭ ne okazas debatoj. Oni eĉ instigetas la legantojn fari diskutajn elpaŝojn en la gazeto. Mi supozas, ke la redakcio ĝojas, ke la legantoj ĝis nun ne agis laŭ tiu instigo.

En numero de «Norvega Esperantisto», kiu venas al la gelejantoj en la komenco de marto, oni trovas taskotabelon por februaro. Raportoj pri kongresoj aperas en la plej bona kazo post du monatoj. En la norvegaj kronikoj oni povas legi pri kunvenoj, okazintaj antaŭ duona jaro. Se «Norvega Esperantisto» ĉerpas informojn el aliaj Esperanto-gazetoj, oni povas supozi, ke la informoj estis jam malnovaj, kiam ili aperis en tiuj gazetoj. La situacio ne pliboniĝas nun, kiam «Norvega Esperantisto» aperas nur sesfoje jare. Cetere: ĉu la estraro de NEL decidis, ke tio okazu ekde 1972, aŭ ĉu oni decidis, ke okazu dum 1972?

Imagu, ke iu leganto sendas al la redakcio diskutatan artikolon. Post du monatoj li povos legi sian kontribuon en la gazeto. Se iu volos respondi al la artikolo, la respondo verŝajne ne atingos la postan numeron de la gazeto, sed

aperos kvar monatojn post la apero de la unua artikolo, do ses monatojn post la iniciato de la unua skribinto. Ĉu tio instigas al debatado?

Otto Prytz.

Norvega Kroniko

Sauda

ESPERANTOKURSO POR INFANOJ Dum 10 semajnoj, de Januaro ĝis Marto, instruistino Elna Matland en Sauda havis kurson por 10 lernantoj, kiuj apartenas al ŝia ordinara 5a klaso en la lernejo. Ili estis lernantoj en Esperanto en ŝia hejmo ĉiun merkredon. Ili ĉiuj partoprenis ĉiujn lecionojn, kaj ekkorespondis kun samaĝuloj en Francujo. La kontakton peris la Koresponda Servo de U.E.A. La foton faris Olav Andersen en Sauda.

KLUBKUNVENO 21-an de februaro ĉe s.ino Olga Overskei. Post referaĵo de la lasta kunveno legita de la sekretario nia prezidanto gvidis la lingvan duonhoron, kaj poste ŝi sciigis al ni pri Esperanto-novaĵoj de en- kaj eksterlando.

Kial hejmlaboron Olav Andersen ellaboris resumon pri la plej konataj eldiroj kontraŭ Esperanto. La intenco estis ke la klubanoj respondu kiel plej bone tiajn asertojn. Tion ili faris kun bona rezulto. Dum paŭzo nia dommastrino regalas nin per bongusta, kaj plej multe hejmfarita manĝaĵo.

Sekr.

JARKUNVENO ĉe s.ino Karen Berge la 17an de januaro 1972.

70% de la geklubanoj ĉeestis kiam la prezidantino malfermis la kunvenon per bonvenigaj vortoj.



La sekretario laŭtlegis referaĵon de la lasta klubkunveno kaj kluban jar-raporton. La jarraporto aprobis kun du aldonoj.

La klubo estas malgranda, sed laŭ la raporto montriĝas ke ĝi bone funkcias kun variaj kaj interesaj programoj en la kunvenoj. La membroj estas aktivaj en la klubo, kaj cetere ili ofte vojaĝas al alilokaj Esperanto-aranĝoj. Preskaŭ la duono de la membraro vojaĝis al la kongreso en Londono, kaj same al la Esperanto-kunveno sur Haukelimonto . . . La kasisto laŭtlegis la reviziitan kalkulaĵon. Montriĝis esti malgranda, sed tamen profito.

Pri elekto de nova estraro la geklubanoj samopiniis pri reelekto, kaj la rezulto estas do:

Prezidanto: Elna Matland
 Vicprez.: Olav Andersen
 Sekretario: Arthur Bjerke
 Kasisto: Robert Rødsås
 Estrarano: Norman Birkeli

«Lingva duonhora» estis gvidata de Elna Matland.

Nia dommastrino laŭtlegis leteron de gesam. Holland loĝantaj en St. Barbara, Usono. Same, parto de letero de nia estinta klubanino Asta Eidem, loĝanta en Australio.

La prezidantino donacis «Trimkalenderen», kaj la sekretario libron por elotado por la kontorfondaĵo, kaj la sumo de gajno estas 30 kronoj.

Dum la kunveno nia dommastrino regalis nin (per helpo de sia filino Målfrid) per bongusta buterkaĉo kaj hejmfaritaj mangaĵoj.

Sekr.

Oslo

17/1.72. Kirsten Ek, kiu estras la Turisman Servon, komencis la kunvenon, kaj okaze de la venonta Universala Kongreso en Portland — ŝi montris filmon pri Usono. La filmo estis fotita el helikoptero, montrante la landon el la aero. Estis treege bela kaj interesa filmo, kiu montris la grandecon kaj diversecon de la usona kontinento, inkluzive la Havajajn insulojn.

Poste Kirsten Ek donis kelkajn informojn pri la vojaĝeblecoj al Usono, sed rekomendis ke interesigantoj turnu sin al F-ino M. Vermaas en Rotterdam, kiu aranĝos komunan kongresvojaĝon. Tamen, se iu dezirus helpon de la Turisma Servo, Kirsten Ek estas preta asisti laŭpove.

La prez. Annalise Rees dankis pro la bela filmo, kaj deziris koran bonvenon al la unua kunveno en 1972, dezirante bonan kaj sukcesplenan novan jaron.

Kiel «Vortojn por pripenso» Randolph Grotmål legis poemon de Piet Hein «Du skal plante et tre.»

«Ni havas grandan taskon antaŭ ni» diris la prezidanto. Mi subskribis kontrakton kun Norges Varemese por partopreno en la ekspozicio «Ferie og Fritid '72» en Sjølyst 13.—23/4. 72. Estas unu el la plej popularaj ekspozicioj — 78 000 personoj vizitis la lastan. Ni sukcesis havi senpagan lokon (stand). La aranĝo postulas multege da laboro, kaj estas dezirinde (fakte absolute necese) ke ĉiuj helpoj kaj faros sian eblon por ke nia partopreno estu sukcesa. Ni planas starigi komitaton konsistantan el la diversaj fakoj, kluboj k.t.p. La Studenta Esp. Societo decidis partopreni — ankaŭ la Fervojistaj Asocio kaj N.E.L.

7/3.72. La vic-prezidanto Thor Magnus Carlsen malfermis la kunvenon. Li legis leteron de s-ino M. Haudebine, kiu dankis pro la salutoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

Okazis Generala Kunsido, kaj la elektoj rezultis jene:

Prezidanto: Annalise Rees.
 Vicprezidanto: Thor Magnus Carlsen.
 Sekr. korespondanta: Kirsten Ek.
 Sekr. raportanta: Pepita de Caspary, (nova).
 Kasisto: Lovise Bøe.
 Estraranoj: Brynhild Østmo kaj Aase Gustavsen.
 Anstataŭantoj: Randolph Grotmål kaj Harda Danielsen (nova).
 Studgvidanto: John Berggreen.
 Propagandestro: Thor Magnus Carlsen.
 Raportis Harda Danielsen.

Hamar

La Norda Stelo havis jarkunvenon la 8an de marto ĉe Ragna Johannesen. Ĉeestis ok personoj.

Dezirinte bonvenon, la prezidanto esprimis sian esperon pri voĉdonado fruktoplana por la evoluo de la klubo.

La sekretario voĉlegis la raporton de la pasinta jaro. Post kelkaj rimarkoj aldonataj al la raporto la membroj unuvoĉe ĝin aprobis.

La kasisto voĉlegis sian raporton kiu estis aprobata sen rimarkoj.

Jen la nova estraro:
 prezidanto: Per Engen (reelekto)
 vicprez. Kåre Bye (reelekto)
 kasisto: Johs. H. Lund (nova)
 sek.: Elise Koller (reelekto)
 anstataŭantoj: Alf Strømness kaj Elisabeth Christensen.
 Post agrabla paŭzo dum kiu oni trinkis

kafon kaj ĝuis la bonajn kukojn de Ragna Johannesen, oni ekstudis la sesan leteron de la koresponda kurso.

Ekino.

STUDENTA ESPERANTO-SOCIETO

La mebronombro de Studenta Esperanto-Societo ankoraŭ estas tro malgranda, kaj la membroj havas tiom da aliaj okupoj, ke la agado de SES ne estas sufiĉe efika. Tamen mi nun povas raporti pri kelkaj arangoj de SES.

Laŭ nia kutimo ni dum la pasinta aŭtuno starigis Esperanto-standon en la Universitato en Blindern. Ĉi-foje la stando donis rezulton: komencan kurson kun ses partoprenantoj. La kurson gvidis C. Støp-Bowitz.

La kurso finiĝis la 9-an de Februaro ĉi-jare, kaj tuj poste, la 12-an kaj 13-an de Februaro, SES okazigis seminarion por siaj membroj. La devizo de la seminario estis: «Konu vian organizaĵon». Sabaton posttagmeze okazis du preletoj: C. Støp-Bowitz parolis ĝenerale pri la strukturo de la Esperanto-movado, kaj Otto Prytz parolis pri la junulara Esperanto-movado. Dimanĉon antaŭtagmeze ankaŭ okazis du preletoj: Olav Rygg prelegis pri la Esperanta literaturo, kaj Ludvig Anjer prelegis pri informado. Post ĉiuj preletoj okazis diskutado, kaj prezentigis kelkaj novaj ideoj. El la ok partoprenantoj de la seminario pluraj apartenis al la ĵus finiĝinta kurso. Kelkaj el ili aktive partoprenis la diskutadon, kaj tio estas esperiga. La seminario okazis en la hejmo de gesinjoroj Støp-Bowitz. Parton de la tempo ni dediĉis al interkonatiĝado kaj agrabla kunestado. Sabaton ni tion faris ĉe vespermanĝo, kaj dimanĉon ĉe tagmanĝo. Ĝenerale oni devas konsideri la seminarion kiel sukceson, sed estas be-

daŭrinde, ke malvarmumigaj virusoj reduktis la nombron da partoprenantoj.

La lasta ĝenerala kunveno de SES okazis la 26-an de Januaro. Dum ĝi oni faris la jenajn elektojn: prezidanto: Nils Chr. Stenseth, vicprezidanto: Otto Prytz, sekretario: Harald Støp-Bowitz, kasisto: Erling Killingbergtrø, estrarano: Arne Aasland, anstataŭantoj: Jon Kvalvåg kaj Olav Reiersøl. Revizoroj: C. Støp-Bowitz kaj Tom Arbo Høeg. Komisiito: studgvidanto: C. Støp-Bowitz, informestro: Nils Chr. Stenseth, komisiito de la eldonejo: Harald Støp-Bowitz, raportanto por «Norvega Esperantisto»: Otto Prytz.

Otto Prytz.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30
Turisma Servo: Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar